*Franda Revuo Efemera Ŝatata de Optimistoj*

# FREŜO

**N-ro 1** *(44)*

**La 01-an de oktobro 2016j**

*La retrevuo estos senpage dissendota nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin*

Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin :-)

*Dnia 01-go pazdziernika 2016r*



# Mia subjektiva juĝnoto

Rafał ZIEMKIEWICZ

**Dek jarojn mi vizitadis fremdajn feriejojn kaj hotelojn. Certe tio donas al mi la rajton resumi kiel statistike kondutas malsamaj nacioj. Jen mia, subjektiva tabelo.**

Surfunde mi metis ***britojn (je la 10a loko)*** . Sendube varbas el ili la plej malbona feriada brutaro. Drinkegas en stuporon, senfine kriaĉas, fumas cigaredojn en malpermesitaj lokoj kaj invento de rubujo ŝajne ne estas konata en ilia lando. Se vi vidas vespere ĉirkaŭ kuŝoseĝoj amason de la rubo, cigaredstumpojn, plastotasojn, taŭzitan folion kaj tiel plu, vi povas esti certa ke ĉi tie ripozis filoj kaj filinoj de Albiono. Aldone ilia korpo, vestita per vastegaj ĉemizoj kaj pantalonoj, kaj ofte "ornamita" laŭ la kutimo de barbaraj popoloj, tatuaĵoj, enkrustaĵoj aŭ truoj en diversaj organoj, ili povas efike malbonigi la apetiton.

Iomete supre estas ***(9) germanoj,*** ĉefe pro bruema konduto. Ne estas ili, kontraŭe al la stereotipo, multe pli puraj ol britoj kaj se temas pri la aspekto... Sufiĉas pririgardi al iliaj bierventroj de tipaj reprezentantoj de la "supera raso" kaj eĉ ambaŭ seksoj (speciale en banejo aŭ lageto).

Poste situas ***(8) poloj*** en deca mezumo, iomete malpli ol la italoj kaj hispanoj. Precipe ĉar ili ellernis ke proksime povas esti aliaj poloj kaj haltis uzadi senzorge vulgarajn vortojn. Ĝenerale, mi notas kun kontento en la lastaj jaroj evidentan progreson kaj mi esperas ke ĝi atestas pri levantaj normoj en persona kulturo.

Agrablaj estas, ĝenerale, suduloj - ***(6,7) italoj, hispanoj***, ĉarmaj, familiaj, gajaj kaj vere kapablas ripozi laŭ la maniero kiu ne perturbas aliajn.

Pli supre mi metis ***(5) francojn***, kaj speciale ĉiam elegantaj ***(4) francinojn***.

Tie estus loko por ***(3) la rusoj*** se ne monstraj kvantoj de cigaredoj kaj adekvata por ĉi tio alkohol-cigareda spiro, devigante konservi ĝustan distancon. Mia speciala simpatio al ili devenas de tio, ke ili kapablas ferii tutfamilie - t.e. gepatroj, nepoj, geavoj sub la suno sursable ludas la kartojn, damludojn aŭ ŝakojn, kaj konstante paroladas unu al la alian.



Ĉi estas ekstrema kontrasto al la germanoj kaj britoj, kiuj superkrias nur ĉe alkoholo, kaj komunikado ene de la familio ŝajnas profunde fremda: li tenas sian nazon en "Bild" aŭ "Sun", ŝi en malkara klaĉgazeto kaj infanoj dum horoj rigardante monitoron de elektronikaj ludoj, eĉ dum manĝado.

Surpinte estas ***(1,2) afrikanoj*** de diversaj landoj, sed ĉefe franclingvaj. Ili estas, ĝenerale, elegantaj, eĉ belaspektaj, bonkondutaj kaj nur simple mi pensas, kiucele ili restadas en la suno dum la tuta tago kaj sunbruniĝas, ja ili estas nigraj kiel ebono kaj vivas ĉiutage en tropika klimato; sed certe tio estas ilia afero.

**Skandinavoj**, la **loĝantoj de la balkanaj landoj k**aj aliaj ne estas en mia tabelo, ĉar ili estis tro malgranda proporcio de la populacio kiu vizitis lokon kie mi feriis .

Kaj kio pri mia ĝeneraligo de rezultoj rilate al la naciaj karakterizaĵoj? Tre malmulte. Unue, la tabelo montras la riĉecon de malsamaj landoj. Terura bildo de la britoj evidentas pro la fakto ke tiu speco de ferio estas por ili malmultekosta, kiu estas uzata de klasoj malaltaj, ofte klientoj de socia prizorgo, kiu unu fojon jare devas financi ferion je eŭropa nivelo.

Mi memoras antaŭ kelkaj monatoj tumulton kiu kaŭzis en Britio profesia senlaborulo kiu fanfaronadis en la amaskomunikiloj ke danke al lerta sperteco li sukcesis koste de la ŝtato vojaĝi ĉirkaŭ la mondo - sed se mi bone scias, nenio de tiu tumulto rezultis.

Ankaŭ por la germanoj "familia feriejo" estas elekto prefere ŝoforo aŭ laboristo ol manaĝero aŭ esploristo. Siavice, Rusio kaj Afriko por tiu speco de ferio povas pagi nur homoj kun alta salajro, advokatoj, entreprenistoj, ktp.

Franda Revuo Efemera Ŝatata de Optimistoj

# FREŜO

N-ro 1 (44)

La 01-an de oktobro 2016j

La retrevuo estos senpage dissendata nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin

Aperos ĉiumonate se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin :-)

Dnia 01-go pazdziernika 2016r



N-ro **1**/ (44)

*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*

*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

LERNU RIDANTE - RIDU LERNANTE

*Mi konas* **multajn ege seriozajn** *gees-perantistojn, kiuj eĉ deklaras malfavoron al ŝercoj kaj anekdotoj, tial:*

*1. Ĉi tiun retrevuon povas ricevadi nur tiuj kiuj klare deklaros volon ricevadi ĝin* **(skribante retleteron al: fresxo@gmail.com )**

*La sekvan numeron de "FREŜO" ricevos nur deklarantoj!*

*2. Se io plaĉos al vi (eble ĉio?) - vi rajtas konservi ĝin en via komputilo... vi konas: dekstra musklavo sur la foton*

**Kunlaboras:**

*Eduardo KOZYRA kaj...*

*Se vi havus proponojn, materialojn por la sekva numero de ĉi revueto - skribu al mi!*

Recenzoj:

pri "FREŜO gAja" ĉiam atendataj

*Mi petas kritiki - speciale pro gramatikaj eraroj :-)*

*Se vi volus, ke ĉi-tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - skribu iliajn poŝtadresojn al:*

**fresxo@gmail.com**

*Ĉefredaktoro:*

**Marian ZDANKOWSKI**

*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*

*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3, 10-343 OLSZTYN, POLLANDO*

*retadreso*: fresxo@gmail.com

*Skajpo: marianzdankowski*

*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:

(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778

Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI

Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3

BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK

Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING, al. Pi" sudskiego 3, 90-368 " ódz

SORT CODE: 11402004

Konto ĉe UEA: mzda-e

**Grave:**

*mi povas gvidi kvizo(j)n dum via E-aranĝo !*

*Vi kontaktiĝu min rilate al ĉi afero !*

**Sur la kovrilpaĝo:**

Gajaj Freŝlegantoj, ĉu vi konas ĉi tiun malriĉan esperantistinon ? Oni devas aĉeti ian palteton por ŝi...






















# La ĉefredaktoro skribas:




Se vi volus **hazarde** printi la revuon en via ĉekomputila printilo - informu min kaj mi preparos fajlon sen verda koloro (tiam ĝi ne estos bezonata) por pli facile printi**.**

Se vi volus printi la revuon en profesia presejo - informu min ankaŭ kaj mi preparos bildojn kun pli preciza kvalito (fajlo kun la revuo estos pli granda sed kvalito estos pli profesia).







Malfeliĉo de mezepoka katolikismo estis konvinko, ke ĉiu devas kredi (je io, je iu) kaj se oni ne estu teisto, oni devas esti dogma ateisto; se oni ne aprecas kapitalismon, oni devas fervore apogi socialismon ktp. ktp. Ĝenerale ekzistas ege popolara opinio, se oni ne kredu je "io" - oni devas kredi je la malo de "io". Miaopinie 'kredo' signifas morton de intelekto, ĉar kiam oni komencas kredi je iu doktrino, oni ĉesas pensi pri tio, al kio la doktrino rilatas, kaj tiumaniere oni limigas memorareon. Oni devas diri eĉ, se persono, kiu nenion kontestas - estas jam morta laŭ klinika vidpunkto, ĉar laŭ nunaj medicinstandardoj - manko de cerba aktiveco difinas vivofinon. -- *Robert Anton Wilson*

# B I B L I O

Laŭ Biblio virino estas la lasta kiun kreis Dio. Li tion faris sabate vespere. Laciĝo rezultiĝis.

====

Sur malpura aŭtomobilo - (jena surskribo): Dio faras miraklojn, sed ne lavas auto-mobilojn.

====

Memoru. Dio ĉion vidas! Vivu tiamaniere, ke Li spektu vin kun in-teresiĝo.

====

Ho Dio, ja Vi estus povinta el tiu ripo fari fajnan elektran tra-jneton…

====

Vi povas esti filo kies vi preferas, sed ĝis tiam, kiam mi fiŝhokos, nenia promenado akcepteblas surface de ĉi tiu lago!

====

Kaj diris Sinjoro: “Se demandus pri mi ateistoj, do mi ne estas”.

====

Kiel rezultas el serva notaĵo, la lastaj vortoj de funkciisto Moczar sonis: “Ho vi kun falĉilo! Haltu! Returnu vin! Sed malrapi…de!”.

====

Kiel komunikas “Anĝela Kuriero”, la sankta Petro ekposedis ŝlosilan funkcion en Ĉielo.




====

Ekde ekstermo de Sodomo – Loto neniam plu plendis pro nesufiĉe saligita supo.

====

Diable! Se mi trafus Ĉielon, tiam mi infere ĝojus pro tio.

====

Atestanto de Javeo (Je-hovo) estas tiu persono, kiu al demando “Kiel vi fartas?” respondas per citaĵo el Biblio.

====

Dum sesa tago Dio kreis viron. Sepan tagon ripozis. Sekve kreis virinon kaj de tiu tempo jam neniu spertis trank-vilecon.

====

Dio certe malbonhumoris kreante kastorojn, eĥidnojn kaj Monthy-Pythonon.

====

Sciencistoj krucis tollavujon, kuirilar-lavujon, roboton, gladilon ktp. Sed kompare al tio, la eltirita ripo de Adamo pli simple rezultigis similan efekton.

====

Kiom oni bezonatas majstrojn de Zen por ŝanĝi elektroampolon? Du, la unua ŝanĝas ampolon kaj la dua meditas.

====

En la tempoj de Kain kaj Abel 50% da junularo konsistis el murdintoj.

====

Adamo demandis al Eva: Ĉu vi malvestos vin mem, aŭ ĉu mi devas atendi eĉ ĝis aŭ-tuno?

====

Mi tralegis Novan Testamenton, ĝi estas sama kiel Malnova. Tio signifas, ke Dio nenion al mi heredigis.

====

# Sen politika ĝusteco







Neniam forgesu










# ATENTU - FROSTO !

| | |
|---|---|
| + 20°C - | **Grekoj** surmetas puloverojn<br>(se nur scipovas trovi ilin) |
| + 15°C - | Homoj en **Jamajko** ŝaltas hejtilon<br>(kompreneble, se ili havas ĝin) |
| + 10°C - | **Usonanoj** komencas skuiĝi pro malvarmo.<br>**Rusoj** en siaj daĉoj (somerdometoj) plantas kukumojn. |
| + 5°C - | Oni povas ekvidi sian spiron.<br>**Italaj** aŭtomobiloj malfunkcias.<br>**Norvegoj** iras naĝi al la maro. |
| 0°C - | En **Usono** frostiĝas la akvo.<br>En **Rusio** la akvo densiĝas. |
| - 5°C - | **Francaj** aŭtomobiloj malfunkcias. |
| - 10°C - | Vi planas feriadon en **Aŭstralio**. |
| - 15°C - | La kato insistas, ke ĝi dormu kun vi en via lito.<br>**Norvegoj** surmetas sveterojn. |
| - 17°C - | En **Novjorko** domposedantoj ŝaltas hejtilojn.<br>**Rusoj** lastfoje ĉijare veturas al daĉoj (somerloĝejoj). |
| - 20°C - | **Usonaj** aŭtomobiloj malfunkcias. |
| - 25°C - | **Germanaj** aŭtomobiloj malfunkcias.<br>Formortis **jamajkanoj**. |
| - 30°C - | Registaro intencas pripensi pri senhejmuloj.<br>Via kato dormas en via piĵamo. |
| - 35°C - | Tro malvarme por pensi.<br>**Japanaj** aŭtomobiloj malfunkcias. |
| - 40°C - | Vi intencas dum du semajnoj bani sin en varmega akvo.<br>**Svedaj** aŭtomobiloj malfunkcias. |
| - 42°C - | En **Eŭropo** ne funkcias transporto.<br>**Rusoj** manĝas glaciaĵojn surstrate. |
| - 45°C - | Formortis **grekoj**.<br>La registaro fakte decidis fari ion por senhejmuloj.<br>Nune pensas kion fari... |
| - 50°C - | Palpebroj frostiĝas dum flagrado.<br>En **Alasko** dum banado oni fermas vazistason. |
| - 60°C - | Blankaj ursoj ekveturas suden. |
| - 70°C - | Frostiĝis la infero. |
| - 73°C - | **Finaj** militservoj evakuas Sanktan Nikolaon el Laponio.<br>**Rusoj** komencas uzi specjalajn ĉapojn kun orelklapoj (uŝankoj). |
| - 80°C - | Juristoj tenas manojn nur en propraj poŝoj. |
| -114°C - | Frostiĝas etilalkoholo. **Rusoj** estas malbonhumoraj. |
| -273°C - | La absoluta nulo, velkas molekula movo.<br>**Rusoj** surhavas tolŝuojn (valonkoj). |
| -295°C - | Formortas 90% de homaro.<br>**Rusaj** futbalistoj venkas Futbalan Mondpokalon. |

# La plej grava afero



**Bonobo** (specio de simioj) fakte ne aperas en zoologiaj ĝardenoj pro tro obscena seksvivo, ekzemple ili praktikas midzon aŭ seks-servoj kontraŭ la manĝado sendepende de la sekso kaj aĝo de partneroj



La regula seksumado ĉe plenkreskaj viroj preventas malgrandigon de peniso.
(manko aŭ tre malofta seksumado rezultas la malaltiĝon de nivelo testosterono kaj atrofion de muskol-lamenoj de kavaj korpoj



Sep tagoj post la lasta ejakulo la nivelo de testosterono ĉe viro atingas 146 % de la normo



Seksumado mildigas la kapdoloron



Kiam 50-jara partnero de Jennie Scott en usona urbo Manatee County denove havis tro fruan ejakulon dum seksumado - virino ekkolerigis kaj komencis bati lin per basbala bastono. Sekve ŝi kuris por preni universalan klevon, sed ŝia partnero tiel kriegis ke alvenis najbaroj al ilia loĝejo kaj malhelpis la pluajn ŝiajn batojn.

# Viroj, kiuj jam komprenis

**Rowan Atkinson (Mr. Bean):**

Bigamio estas tiam, kiam vi posedas unu edzinon tro. Monogamio estas la sama.

**Eminem (kantisto):**

Estas ridinde, ke viro, kiu devas ĉagreniĝi pri nenio, abrupte... edziniĝas.

**Jörg Knör (farsulo):**

Virino estas nurnura trofeo, kiu atakas ĉasiston.


**Bernd Stelter (aktoro):**

Geedzeco estas kiel vizito en restoracio: vi povas pensi, ke vi elektis perfekte - ĝis la momento kiam vi ekvidos kion ricevis gasto ĉe najbara tablo.

**Nick Nolte (aktoro):**

Virinoj - por plibonigi sian aspekton - faros tiujn aĵojn, ke vendisto de uzitaj aŭtomobiloj (pro similaĵoj) estos enkarcerigota.

*Filo demandis min, kiel mi sentiĝas kiel "edzo"?*



*... tiam mi forĵetis el lia komputilo ĉiujn kanzonojn krom unu !*

**Günter Willumeit (komikulo):**

La ĉefa kaŭzo de divorco estas kaj restos - geedzeco.

**Jack Nicholson (aktoro):**

Nur unu estas pli kara ol edzino, nome eksedzino.

**Charles Bukowski (verkisto):**

Fenimismo ekzistas nur pro tio, por ke en socio integri malbelajn virinojn.

**Burt Reynolds (aktoro):**

Ĝis ungolako sur ungoj ankoraŭ ne sekigos - virino estas sendefenda.

**Rod Stewart (rokkantisto):**

Oni devas edziniĝi nur kun belaj virinoj. Alimaniere mankas eblecoj por forigi ilin.

**Peter Ustinov (aktoro):**
Mi dubas, ke viroj en geedzeco pli longe vivas. Simple ili ege enuiĝas.

**Mario Adorf (aktoro):**

La viro de sukceso estas, kiam li perlaboras pli multe ol lia edzino elspezas. La virino de sukceso estas kiam ŝi trovos tiun (kaj edziĝos).

**Bill Vaughan (aktoro):**


Nuntempe virinoj laboras ĉie... estras firmaojn, esploras, eĉ servas en armeo. Kial do ili ne

# NACIOJ



**Francaj tankoj...**

**Estas interese kiom da rapidumoj malantaŭaj havas la francaj tankoj ? Antaŭen probable nur unu...**



**Brusela monumento de belga reĝo Leopoldo la 2-a (1865-1909)**

Leopolda la 2a estis unu la plej grandaj murdintoj en historio, li kaŭzis la morton de dek kelkaj milionoj da homoj, la indiĝenoj de lia privata kolonio - La Belgia Kongo. Malgraŭ kritika pritakso kaj aprobo de murdigado granda parto de belgoj daŭre havas por li sentimenton kaj estimon, kion pruvas konstruita por li monumentoj (i. a. en centro de Bruselo aŭ en Laeken, la oficiala sidejo de belgaj reĝoj) kaj pluraj parkoj, lernejoj kaj institucioj portas lian nomon.



En la jaro 1919 generalo Reginald Dyer ordonis al siaj soldatoj pafi al 10.000 (dek mil) nearmitaj homoj en Jallianvala Bagh en urbo Amristaro (Hindujo). Tiuj homoj kolektiĝis dum la Sik-festivalo por protesti kontraŭ regado de britoj kaj batali por sendependeco de Hindujo.

**Ĝis hodiaŭ tio estas unu el plej teruraj masakroj de hindoj, kiuj kaŭzis britaj soldatoj.**



**Hodiaŭ frumatene Norda Koreio atakis Usonon**

Israelo deziras pliakrigi cenzuron en "Fejsbuko"



La reprezentantoj de "Fejsbuko" iris al Israelo por akiri interkonsenton pri la cenzurado de neoportunaj opinioj por sionistoj.

La vero faras vin libera.
Sed kiucele al iu la libereco?


# LA PLEJ GRANDA SEKRETO

## DE MEDIOJ EN 21-a JARCENTO

**Islandanoj decidis, ke ilia registaro devis rezigni**, ĉar aprobis la ordonon de monda financo malriĉigi la islandan nacion (laŭ la scenaro aktuale "aplikata al" Grekio)!
La ĉefaj bankoj en Islando estis ŝtatigitaj kaj la loĝantoj decidis unuanime deklari la nesolventecon de la ŝuldo kiu estis farita de falintaj privataj bankoj en Britio kaj Nederlando.
Ili decidis ke Nacia Asembleo ŝanĝu la konstitucion.
Kaj ĉio en paca maniero. Ĝi estis vera revolucio kontraŭ la registaro. Kontraŭ la Registaro kiu kondukis Islandon al la nuna kolapso.
Certe vi estas scivolanta kial tiuj okazaĵoj ne estis vaste diskonigitaj? La respondo al tiu demando kondukas al alia demando: kio okazus se la resto de la eŭropaj nacioj sekvus la ekzemplon de Islando?

**Jen mallonga kronologio de la faktoj:**

**Septembro 2008**: ŝtatigo de la plej grava banko en Islando, Glitnir Banko, rezultigante, ke la borso haltigas sian funkciadon kaj estas deklarita bankroto de la lando.
**Januaro 2009**: protestoj de loĝantoj antaŭ parlamento kaŭzis la rezignon el la posteno de la ĉefministro Geir Haarde kaj de la tuta registaro kaj rezulte pli fruaj elektoj. La ekonomia situacio estis ankoraŭ malbona sed la parlamento dekretas la leĝon, laŭ kiu oni ŝarĝas islandajn familiojn per privata ŝuldo de privataj bankoj (britaj kaj nederlandaj). Ŝuldo valoras ĉ. 3,5 miliardoj da eŭroj kaj ĉiu islanda familio dum 15 jaroj devus pagi ĝin ĉe interezo de 5,5%/jare.
Responde komenciĝas la dua etapo de paca revolucio.



**Komence de 2010**: la loĝantoj okupas denove la placojn kaj stratojn, postulante referendumon en menciita afero.
**Februaro 2010**: Prezidanto Olafur Grímsson vetois la leĝon proponitan de la parlamento kaj anoncis nacian referendumon en kiu 93% de balotantoj deklaris ne pagi bankajn ŝuldojn.
Intertempe, la registaro ordonis la juĝan esploron celantan malkaŝi kulpulojn, kiuj kaŭzis la krizon. Oni arestis la unuajn bankistojn, sed multaj el ili saĝe pli frue forkuris el Islando.
En tiu kriza momento estis establita Nacia Asembleo, kiu devis krei novan konstitucion konsiderante la sperton de la ĵus "tralaborita leciono". Tiucele estis selektitaj 25 personojn senpartiaj inter 522 kiu aperis por voĉdoni. Kriterio por la selektado - krom senpartieco - estis plenmaturiĝo kaj apog-subskriboj de 30 civitanoj. Menciita Nova Konstitucia Konsilio komencis labori en februaro, kaj post la fino prezentis la rezulton kaj proponis al voĉdonado en la balotado.

Ĉu iu aŭdis pri tiuj ĉiuj aferoj en la eŭropaj amaskomunikiloj? Ĉu oni vidis, almenaŭ unu foton de tiuj okazaĵoj en ajna televidprogramo?

**Kompreneble - NE!**

Sed tiumaniere, la islandanoj donis lecionon de rekta demokratio kaj nacia kaj mona sendependeco por la tuta Eŭropo.

**Ili pace kontraŭstariĝis al la Sistemo.**
Minimume tion, kion ni povas fari - estas konscio de tio kio okazis, kaj fari ĝin **legendon** kiu nun "flugu de loko al la loko".
Ni memoru ke ni ankoraŭ havas la kapablon por preteriri manipuladon de amaskomunikiloj servantaj por la ekonomiaj interesoj de la bankoj kaj grandaj multnaciaj korporacioj.

**NI NE PERDU tiun ŝancon kaj NI INFORMU ĉiuflanken, por ke en la estonteco preni similan agadon, se estos bezono.**

# JEN LA VIV'



Kiam Ĥufu (Keopso) ne plu havis monon por kotinui konstruadon de sia fama piramido, li ordonis al sia filino, ke ŝi prostituu sin. Greka historiisto - Herodoto, skribis ke entreprenema filino ne nur akiradis monon por sia patro sed okaze perlaboris la monon por si mem, postulante de ĉiu kroma kliento unu piramid-blokon, de kiuj poste ŝi sukcesis konstrui sian propran malpligrandan piramidon.




96-jaraĝa Milly Cooper estas la plej maljuna en la mondo ekskluziva prostituitino. Eĉ, danke al siaj muljaraj spertoj ŝi ricevas pro siaj servoj grandegajn monsumojn.



Seks-turismo aspektas jene:
la riĉaj germaninoj veturas al varmaj landoj,
kaj malriĉaj ukraininoj venas al Germanio



La plej juna patrino en la historio estis
Lina Medina.
Kiam la 14-an de majo en 1939j ŝi naskis filon - ŝi estis nur preskaŭ 6-jaraĝa.




Usona feministino Camille Paglia avertas, ke "gender" (seksa identeco) estas kreita por komplekse ĉantaĝi virojn. Oni devas instrui, ke viroj ne povas diri kion ili pensas pri virinoj, neniam ili devas prezenti siajn emociojn aŭ libidon (ĉar ĉi tio estas fundamentoj seksa hipokriteco). Ŝi aldonas, ke produkto de menciita sistemo estas viroj sen kreativeco kaj karaktero, kiuj estas narcisistaj, timigitaj, subiĝemaj de virinoj - simple: karikaturoj de viroj.

# Viraj reguloj

1. Mamoj estas tiucele, por admiri ilin, tial ni rigardas ilin. Ne provu ŝanĝi tiun.

1. Lernu operacii la klapon de la necesejo. Vi estas jam granda knabineto. Se la klapo estas leviĝinta - malleviĝu ĝin. Ni bezonas leviĝintan klapon, vi malleviĝintan. Certe neniu el ni plendis ke vi forlasis klapon malleviĝintan.

1. Sabato = matĉo.
Estas tio kiel la plenluno aŭ alfluoj kaj defluoj de la maro. Tiel estas !

1. Butikumado NE ESTAS sporto. Kaj NE!... neniam ni pensos ke ĝi estos sporto.

1. Ploro estas ĉantaĝo.

1. Diru malkaŝe kion vi volas kaj pri kio temas. Estu klareco:
- kaŝitaj aludoj NE FUNKCIAS !
- mencioj NE FUNKCIAS !
- eŭfemismoj NE FUNKCIAS !
SIMPLE DIRU PRI KIO TEMAS !

1. "Jes" kaj "ne" estas la perfektaj respondoj al 99% de niaj demandoj.

1. Venu al ni nur kun problemoj, kiuj vi volas solvi. Ni solvas problemojn. Se vi volas kompaton - tiucele vi havas amikinojn.




1. Kapdoloro daŭranta dek sep monatojn estas problemo. Iru al la kuracisto.

1. Ĉio, kion ni diris antaŭ 6 monatoj NE POVAS esti uzata kiel argumento en la kverelo. Vere ĉiuj niaj komentoj post sep tagoj iĝas malvalidaj.

1. Se vi pensas, ke vi estas dika, verŝajne vi estas. Ne demandu nin pri tio.

1. Se ion ni diris povas esti interpretita dumaniere, kaj unu el ili ĝenus vin aŭ ĉagrenus - oni signifas la duan eblecon.

1. Vi povas peti al ni fari ion aŭ klarigi kiel ĝi devus esti farita. Sed ne ambaŭ aferoj samtempe. Se vi scias kiel fari aferon bone - faru ĝin mem.

1. Se eblas, diru al mi, kion vi devas diri - dum reklamvideoj.

1. Kristoforo Kolumbo ne bezonis mapon, ni ankaŭ ne bezonas ĝin.
1. Ĉiuj viroj vidas nur 16 kolorojn (kiel la defaŭlta paletro Vindozo 95). Persiko, ekzemple, ne estas koloro sed frukto. Salmo ankaŭ - ne koloro sed fiŝo. Ni absolute ne konas la nocion de la vorto "amaranto".

1. Se io jukas nin - ni tiam gratas tion. Estas ĉio...

1. Se ni demandas vin kion okazis kaj vi diras: "Nenio!" - ni kondutos kvazaŭ ĉio estas bone. Ni scias ke vi mensogas, sed ĝi ne indas por ĉagreniĝi.

1. Se vi demandas ion, sed vi preferus ne scii respondojn, atendu respondojn, kiujn vi ne volas aŭdi.

1. Kiam ni devas iri ien, kaj vi survestos ion ajn - ĉio estas vidinda. Vere!

1. Ne demandu nin, kion ni pensas, se vi ne estas preta interparoli pri temoj kiel ekzemple: sekso, futbalo, piedpilko, aŭtoj, politiko...

1. Vi havas sufiĉe vestojn.

1. Vi havas tro da ŝuoj.

1. Mi havas bonan figuron. Cirklo estas ronda kaj rondo estas ja figuro.

**Ne sen kialo, ĉiuj reguloj estas markitaj kun la numero 1**

# Ĉu vi scias, ke...




**Foje mi dezirus, ke ĉiuj religioj troviĝu sur la fundo de la maro.** Tiu kiu regas helpe de la religio, estas malforta reganto. Li implikas sian propran popolon en kaptilon".

Mustafa Kamal Ataturk (1881-1938), la patro de moderna Turkio.



**Dum la historio de la Romkatolika Eklezio multaj klostroj plenumis la rolon de bordeloj.** *Ekzemple*: en monakinejo en Kirchheim (ĉe Teck) okazadis senbridaj seks-orgioj, same en la klostro Kirchberg (ĉe Sulz). Kiel publikaj bordeloj konataj estis klostroj en Interlaken, Frauenbrunn, Trub, Gottstadt ĉe Berno, Ulm kaj Mühlhausen. Dum malkonstruo de klostro de Sankta Brigito (Mariakron) oni trovis en diversaj lokoj kaŝitajn kaj enfositajn infanetaj kapetoj kaj infan-skeletoj.






Mil jarojn antaŭe - en la jaro 1015 - oni ordonis **la devigan celibaton** por la pastroj de Romkatolika eklezio.




**Ŝaĥo Muhammado, la fanatika islama reganto de la lando Ĥorezmo,** ordonis murdi ĉiujn komercistojn de mongola karavano ĉar ili estis kredantoj de alia religio ol liaj subuloj. Maltrankviligita Ĝingis-Ĥano sendis diplomatojn por ekscii kio okazis. Tamen ili ankaŭ estis murditaj. Rezulte de tio mongola reganto decidis ekstermi ĉiujn islamanojn, kaj iliaj urboj neniigi. Dum lia militiroj oni mortigis 30-50 milionojn da homoj, plejparte muslimanoj.

# RELIGIO

Kiom oni bezonatas majstrojn de Zen por ŝanĝi elektroampolon? Du, la unua ŝanĝas ampolon kaj la dua ne ŝanĝas.

====

En la tempoj de Kain kaj Abel 50% da junularo konsistis el murdintoj.

====

Adamo demandis al Eva: Ĉu vi malvestos vin mem, aŭ ĉu mi devas atendi eĉ ĝis aŭtuno?

====

Mi tralegis Novan Testamenton, ĝi estas sama kiel Malnova. Tio signifas, ke Dio nenion al mi heredigis.

====

Bonan tagon, ĉu vi volas paroli pri Dio? Mi aŭskultas, kion vi volas scii pri mi?

====

El letero de apostolo Paŭlo al korintianoj: Fratoj!...Kiam fine vi respondos al mia unua letero?

====

Ĉu vi scias, ke al ĉielo trafas maksimume nur 10% da virinoj? Tio ja estas jam desupre stabiligita. Se estus kontraŭe, tiam tie ankaŭ iĝus infero.

====




Kontemplacioj aperas tiam, kiam atestantoj de Javeo vin vizitas.

====

Kiamaniere la duan de februaro oni povas trovi praktikantajn katolikojn sur la strato? Tiujn oni devas kun kandelo serĉi.

====

Kiel sin krucosignas matematikistoj? En nomo de Gausso, Riemano kaj Newtono, epsilon.

====

Nun mi jam estas certa: Paradizo estas la loko, kie ne estas vekhorloĝoj, gvidantoj kaj … hundoj.

====

Laŭ plej novaj esploroj pri DNA oni fiksis, ke virino estis kreita el ripo de serpento…

====

La Biblio instruas nin ami. Sed Kamasutro tamen kiamaniere.

====

La dektrian tagon de navigado Noa rimarkinte siajn filojn, ekkonkludis, ke certe holere estas forgesinta pri io.

====

Ateistoj havas unu personon malpli, al kiu ili povus sin turni dum orgasmo.

====

Je komenco nenio estis. Kaj Dio diris: estu lumo. Kaj nenio plu estis, sed tio estis pli videbla.

====

Jesuo estas lumo. La noktpapilioj certe estas Lin adorantaj.

Esperantigis: Edward Jaskiewicz

# PRIPENSOJ







Multaj problemoj rapide malaperus, se homoj eklernus interparoli **unu kun la alia,** kaj ne: **unu pri la alia.**



PRIPENSOJ - vortoj, kiuj fervorigas, fortigas, aprobas

**10 temoj, pri kiuj via patrino neniam parolis kun vi**



1. Via patrino ploris pro vi pli ofte, ol vi supozas.
2. Foje ŝi deziris formanĝi la lastan pecon de la kuko, sed tamen fordonis ĝin al vi.
3. Ofte ŝi suferis.
4. Ofte ŝi timis.
5. Ŝi ofte observis vin dum via dormado.
6. Ŝi zorgadis pri vi pli longe ol nur naŭ monatoj.
7. Ŝi sciis, ke ŝi certe ne estas perfekta, sed ŝi faris la plej bone kiel eblis laŭ sia scipovo.
9. La plej dolora por ŝi estis tiuj el viaj ekkriitaj vortoj: "Mi malamas vin".
10. Eĉ se ŝi nun povus returni la tempon, tamen ŝi denove farus por vi la samon ankoraŭfoje.

**Kiu diris, ke cigaredoj mortigas?**



**Mi estas 40-jaraĝa kaj ankoraŭ mi fartas bonege.**

# POLITIK(et)O

**Mortaĉu sane !**
S-ino *Hilal Elver*, speciala delegitino de UN pri nutraĵ-rajtoj asertas, ke ĉiam pli facile akireblas en la nuna mondo la rapidaj nutraĵoj(fast-food), kaj tio kolizias kun la hom-rajtoj por pli konvena nutrado. Ŝi kritikas ankaŭ la liberigon de vendado, kio helpas por grandaj korporacioj aperigi en la merkato siajn malmultekostajn nutraĵojn, pro tio malriĉuloj havas dilemon: ĉu mono aŭ konvena nutrado. Ŝi postulas, ke ŝtatoj faru la leĝon por kontraŭi la nutrad-industrion, ke ĝi ne influu la nutrad-politikon. Samtempe Eŭropa Parlamento alvokis por la deviga limigo de industrie produktataj lipidoj, kiuj laŭ opinio de europ-parlamentanoj kaŭzas la infarkton de miokardio, obezecon kaj Alkzheimer-malsanon (Alchajmeron).
*Ŝi (tiu stultulino) deziras malhelpi al malriĉuloj aĉetadi la malmultekostajn nutraĵojn kaj devigi ilin aĉetadi multekostajn nutraĵojn. Sed malriĉuloj ne havas la monon, do ili devus malsati. Tamen pli bone estas vivi malplibone ol mortaĉi pro la malsato.*

**Denove**
La kontrauleghaj enmigrantoj, kiuj deziris veni el Libio tra la Sicilia Markolo al Italio, forjhetis en la maron dekkelk-kristanojn devenintaj el Nigherio kaj Ganao kaj kiuj rezulte dronis. Kiam pontono venis al Sicilio, la polico arestis la 15 kauzintoj montritaj de aliaj enmigrantoj, kiuj detale rakontis pri la okazintajho dum la ponto-navigado. La arestitoj okazis la enmigrantoj el la Ebur-Bordo, Malio kaj Senegalo. Inter la akuzitoj estis unu neplenaga, tamen chiuj esti akuzitaj, ke ili mortigis tiujn kristanojn. En la pasinta jaro la Europa Unio reduktis siajn sav-agadojn en la Mediteraneo, char aperis la argumentoj, ke tio instigas pli grandan enmigradon. Tamen la lastaj informoj montras, ke tiu movo ankau okazis senrezulta.
*Iam la kristanojn oni jhetadis antau la leonojn. Hodiau oni jhetis ilin en la maron.*

**Subvencio por bordelo**
Laŭ "*The Daily Express*", Europa Unio donis monon por renovigi la ĉeĥan bordelon. Europaj oficistoj donis monon por la ĉeĥa noktoklubo en kiu junaj rusinoj prostituas sin. La klubo ĉe la urbo Cheb ricevis subvencion 40 mil da eŭroj por la renovigo de la domo. Tiam Mario Borghezio, la itala eŭrop-deputito ekdemandis, ĉu Europa komisiono estas konscia, ke tio estas jam ekstremece uzita la europa mono.
*Mi diru, la tuta Europa Unio tio estas unu granda bordelo, do ni ne miru.*




**Barelo da polvo**
Siria armeo minacis, ke pafsurterigos chiun turkian milit-aviadilon, kiu aperos en siria aer-spaco. Lastatempe turkia aer-armeo aviadilatakis la kurdan milicon en Sirio, apogatan de Usono. Registaro de Damasko en sia demarsho nomis la aviadilatakon "okulfrapa agreso".

*Tio jam estas vera barelo da polvo. Kiam ghi eksplodos?*

**Ia dometo**

Aŭstria Ministerio de Enlandaj Aferoj planis detrui la domon el la 17a jarcento en urbo Braunau en Supra Austrio, en kiu naskiĝis Adolfo Hitlero, tamen tiu informo elvokis kontraŭon de multaj ekspertoj. Tiam oni decidis, ke okazos la arkitektura konkurso pri ĝia rekonstruo. Oni planas, ke la domo havos ofican funkcion aŭ tie estos ia sociala institucio, ĉar oni devas protekti la familian domon de Hitlero, ke ĝi ne estu la pilgrim- kaj memorloko por nov-nazioj.
*Estas opinio pri aŭstroj, ke ili sukcese persvadis al la mondo, ke Hitlero estis germano kaj ke Austrio estis la unua viktimo de nazia Germanio. Pro tio nun austroj havas embarason kaj la plej volonte ili eksplodigus ĝin.*

**Oni mortigas vian frateton**
La norvega ministerio pri sano decidis, ke virinoj kun la ĝemelgravedo, sendepende de sia civitaneco rajtas fari aborton de unu el la ĝemelaj fetoj, eĉ se ne estas la medicinista konsilo. Similan aborton povas fari virinoj kiuj ne loĝas en Norvegio. Kuracistoj ne aprobas la ministerian decidon kaj ili opinias, ke tia selektiva aborto estas danĝera por la dua infano en la sino de la patrino kaj povas rezulti la aborton. En Norvegio oni rajtas fari aborton ĝis la 12 semajno de la gravedo.
*Ho, kie estas la tempo, kiam vikingo certe venĝus, se lia edzino abortigus lian idon.*

**Kondomoj en Parlamento**
Germanaj parlamentanoj akceptis regulojn, kiuj malpermesas seksumi sen kondomoj kun prostituitinoj.
La posedantoj de bordeloj devos informi klientojn pri la novaj reguloj. Celo de la ŝanĝoj estas protekto de prostituitinoj. Prostituado en Germanio estas laŭleĝa.
*Pri la seksum-pozicioj oni ne parolis.*

# MALPOLITIKAJ EMFAZOJ



**Amika germano, kuraĝa franco, svelta usonano, sobra polo kaj ĉino kun granda peniso eniras la stardrinkejon kaj tiam sidanta ĉe la bufedo judo diras al la laboranta tie nigrulo: "Ĉio je mia kosto". Tiam ĉe la apuda tablo budhisto ekkomencas bati la araban kristanon, anglo krias por bufedisto, ke li ne deziras teon, kaj finfine eniras romao kaj demandas: "Kiu perdis monujon?" trovitan de li en la necesejo kiam li lavis manojn.**



# Bone kaj malbone


1.
**BONE:** Via edzino gravediĝis.
**MALBONE:** Ŝi atendas trinaskitojn.
**MALBONEGE:** Vi estas malfekunda.

2.
**BONE:** Via edzino ne interparolas kun vi.
**MALBONE:** Ŝi volas divorci.
**MALBONEGE:** Ŝi estas advokato.

3.
**BONE:** Via filo maturiĝas.
**MALBONE:** Li ekflirtis kun 40-jaraĝa najbarino.
**MALBONEGE:** Vi ankaŭ.

4.
**BONE:** Via filo multe da tempo restadas en sia ĉambro.
**MALBONE:** En lia ĉambro vi trovis pornografiajn filmojn.
**MALBONEGE:** En kelkaj de la filmoj vi estas ĉefrolulo.

5.
**BONE:** Via edzo decidis: "Sufiĉas jam infanoj!"
**MALBONE:** Vi ne povas trovi kontraŭgravediĝajn pilolojn.
**MALBONEGE:** Ilin havas via filino.




6.
**BONE:** Via edzo scias multe pri la modo.
**MALBONE:** Vi malkaŝas, ke li sekrete surmetas viajn vestojn.
**MALBONEGE:** Li pli bone aspektas en ili ol vi.

7.
**BONE:** Vi klarigas por via filino kiumaniere faras "tion" abeletoj.
**MALBONE:** Ŝi senĉese interrompas vian rakonton...
**MALBONEGE:** ... kaj korektas vin...
**TRAGIKE:** Ŝi scias pli multe ol vi.

8.
**BONE:** Via filo havas la unuan rendevuon.
**MALBONE:** Kun viro...
**MALBONEGE:** ... kiu estas via la plej bona amiko.

9.
**BONE:** Via filino tuj post altlernejo trovis laboron...
**MALBONE:** ... kiel putino.
**MALBONEGE:** Viaj kolegoj estas ŝiaj klientoj.
**TRAGIKE:** Ŝi gajnas pli multe ol vi.


10.
**BONE:** Legante ĉi tiun tekston vi ridis.
**MALBONE:** Vi konas homojn kun similaj problemoj.
**MALBONEGE:** Vi estas unu el ili.


# Kiel nomiĝas la subaj gegravuloj ?


















# Greka tragikomedio

*. La nivelo de edukado en Grekio estas la plej malalta en la EU, malgraŭ la fakto ke por lernanto estas tri fojojn pli instruistoj ol en Finnlando, kie la edukad-nivelo estas plej alta.*

*. Bruselo demandis Grekion ĉu eblas, ke vivas ĉ. 11.000 personojn pli ol 100-jaraĝaj. Grekoj kontrolis, kaj rezultiĝis ke tiaj homoj estas 800 (okcent). La ceteraj jam delonge ne vivas, sed la familio ne raportis la morton kaj kolektas pension.*

*. En la kvartalo Ekali (antaŭurbo de Ateno) en impostaj deklaracioj oni malkaŝis 324 basenojn. Kiam la registaro anoncis ke ĝi kontrolos per la satelito kiu havas naĝejon, en vendejoj mankis la kamuflilreton. Entute en Ekali estis 16.974 basenojn.*

*. Kvankam lago Copais estis sekigita en 1957j (antaŭ 55 jaroj), 30 oficialuloj en plentempa laborposteno ankoraŭ administras la tutan "agadon" ..*





*. Unuaj rezultoj de interna kontrolo en la Ministerio de Financoj montris ke 234 oficistoj de ministerio ne prezentis impostan deklaracion por la antaŭa jaro. Kaj 20 direktoroj de impostaj oficoj estis maldungitaj, kiam evidentiĝis, ke en liaj regionoj, homoj amase ne pagas impostojn.*

*. Senĉese laboras establita de la greka registaro agentejo por la promocio de Tesaloniko, kiel "eŭropa urbo de kulturo" en 1997 jaroj ....*

*. Greka registaro pagas aldonan monon tiel nomatan "edziĝ-aldonaĵo" kiu mezuras 10% de salajro. Ricevas ĝin ambaŭ edziĝintojn, ĉiu en sia laborejo. Aldonaĵon rajtas preni ankaŭ vidvinoj, vidvoj kaj personoj divorciĝantaj.*

*. La registaro pagas ankaŭ t.n. "komputil-aldonaĵon" (15% de salajro) por personoj kiuj dum plimulto da labortempo sidas ĉe komputilo.*


*.Greka registaro pagas ankaŭ aldonaĵon por kono de fremda lingvo (10% de salajro). Ĝi estas por ĉiuj, kiuj konas almenaŭ unu fremdan lingvon (estas bezonata neniu atestilo nek konfirmilo!)*

*. Ekzistas aldonaĵo al la filinoj de generaloj kaj koloneloj, se ĝis 30 jaroj de aĝo ne edziĝos. Tiam, la ŝtato rekonas ke ili povus esti mistraktitaj en infanaĝo, pro milita familio kaj pagas al ili po 2.000 eŭrojn monate. ..*

*. Malgraŭ tio, ke Grekio havas la plej grandan administracion en Eŭropo - greka konstitucio malpermesas maldungi dungitan jam oficiston. Konstitucio garantias ĝismortan dungecon.*
*Ni gratulas...*



# FREŜA VENTO PRO HUMURA SENTO!





Mi asertas, ke tipa homo de Esperantujo estas ege serioza, tre fundamenta kaj severa. Eble mi eraras, sed ĉi tiu eco de karaktero distingas nin de la tuta popolo. Mi ne scias, ĉu estas bone aŭ malbone kiam mi aŭdas deklaron flanke de la ĉefredaktoro de mia laŭdata E-revuo, ke li ne ŝatas ŝercojn kaj humuron. Mi ne scias kion opinii, se iu estrino de E-klubo diras, ke ŝi ne toleras anekdotojn kaj ŝercojn.
Kaj tial...












# **Oni devas tralegi** (bedaŭrinde)

**Edzina pledo**

Sinjorino plendas al amikino pri sia edzo:
- Li estas tia. Dum la tuta jaro li vojaĝadas, nur dum unu monato li estas hejme.
- Tio devas esti tre teda vivo por vi, ĉu ne?
- Nu ja, tiu monato tamen rapide pasas...

**La Pastro**


Sinjorino malsaniĝis kaj ne povas iri al la diservo en la dimanĉo. Tial ŝi sendas tien sian edzon. Kiam li revenas, si pridemandas lin:
- Nu, ĉu vi estis je la diservo?
- Jes, respondas la sinjoro.
- Ĉu estis bele?
- Jes.
- Cu la pastro predikis?
- Jes.
- Ĉu vere? Kaj pri kio?
- Pri pekado.
- Kaj kion li diris?
- Li kontraŭas.

**Anonco en Gazeto**

"Edzigonta junulo serĉas kontakton kun sperta sinjoro, kiu konvinku lin ne fari tion."

**Diri la veron**

Maljunulo sentas sin mortonta kaj vokas sian multe pli junan kaj viglan edzinon al si:
- Nun mi baldaŭ mortos... diru al mi sincere, cu miaj infanoj vere estas miaj...
- Sed... hezitas la edzino. Kaj se montriĝos, ke vi ne estas mortonta?



**Spertulo**

Turisto vizitis ekspozicion de pentraĵoj kaj parolis al sia amiko:
- Tiu ĉi pentraĵo estas vere realisma. Ĝi vekas mian apetiton.
La konulo tiel demandis:
- Kiel eblas, ke sunsubiro vekas vian apetiton?
La turisto respondis:
- Ĉu tio estas sunsubiro? Mi pensis, ke estis fritita ovo!

**Sperta pentristo**

En pentraĵa ekspozicio en Parizo, la vizitanto demandis la pentriston kiu staris apud li:
-Kion prezentas tiu ĉi bildo?
-Bovinojn sur paŝtejo.
-Ho jes! Sed paŝtejon tie mi ne vidas - respondis la vizitanto.
La pentristo tiel klarigis:
-Tiun la bovino jam formanĝis.
-Sed, majstro, tie mi ne vidas eĉ unu bovinon!
-Mi demandas vin - diris la pentristo - kial restu tie la bovoj, se tie jam ne estas herboj?

**Hejma konflikto**

La junaj geedzoj havis konflikton hejme kaj poste dum la aŭtoveturado ili ambaŭ obstine silentis. Preterpasante aron da azenoj, la edzo diris moke:
-Ĉu viaj parencoj?
La edzino:
- Jes, boparencoj.

**En la lernejo**
Instruisto, ĉu oni povas puni iun pro io, ke li ne faris?
- Ne, tute ne! Kial? demandas la instruisto.
- Mi ne faris la hejmtaskon...

**Diri la Veron**
Viro ekvidis belulinon kaj li diris:
- Kiel belega vi estas!
Kaj si respondis:
- Dankon! Sed bedaurinde mi ne povas diri la samon al vi...
- Nu, faru kiel mi, ne diru la veron!!!

**Paradizo**
Adamo rakontas:
- Ci nokte mi songis pri vi, Eva.
- Ho, cu vi faris?
- Ne, mi ne rajtis.



**Solvo el la paĝo 20:**

1. Abraham LINCOLN; 2. Angela MERKEL; 3. Elizabeta La Dua; 4. Fidel CASTRo; 5. Gerhard Schroeder; 6. Princo KAROLO; 7. John KERRY; 8. Barack OBAMA; 9. Nikolao SARKOZY